

La Espero

1975-4

Svenska Esperantotidningen

Fondita en 1913

Halmstad sin montris el sia plej bona flanko kiam esperantistoj el la tuta lando kolektigis tie en la pentekostaj tagoj meze de majo por la jarkongreso de la Sveda Esperantofederacio. Sunbrila, bela vetero, komforta kongresejo, perfekta aranĝo — unu el la plej bonaj jarkongresoj iam, diris kelkaj partoprenantoj.

Laŭ Oskar Svantesson en **Mundo** jam la kongresmarko estis plaĉa laŭaspekte. Ĉirkaŭ cent personoj ĝin portis. La plej multaj loĝis en la kongresejo, la motelo OK. Ĝi estas unuaklasa hotelo kaj la prezoj estas ankaŭ unuaklasaj. Por la gejunuloj tamen troviĝis ĉi-jare pli malmultekosta — eĉ senkosta — loĝejo aliloke en la urbo. Modela aranĝo. Ĉeestis ankaŭ kelkaj gejunuloj — sed ni volonte vidus pli multajn alian jaron. La kongresejo troviĝis ekster la vera urbo. Ĝi estis komforte atingebla por tiuj kiuj alvenis per aŭtoj. Por tiuj kiuj veturis vagonare la halmstadanoj aranĝis transportadon per aŭtoj, kaj tio evidente ankaŭ bone funkciis.

Solena malfermo

Bonvensalutis la prezidanto de Loka Jarkongresa Komitato, Gunnar Tengling, kaj la prezidanto de SEF, Jan Strönné. Krome muziko kaj prologo. La urbo Halmstad regalis per la eksterordinare bongusta manĝo je la bankedo pli malfrue dum la pentekosta vespero. Bonvensalutis la prezidanto de la urba estraro, Lars Svensson.

Jarkunveno de SEF

Curt Alf el Norrköping kiel kutime gvidis verve kaj elegante la traktadojn. La jarraporton — el kiu resumeto aperis en la antaŭa numero de La Espero — oni akceptis sen debato. Precipe oni ĝojis, ke por la unua jaro el longa vico, SEF ne havis deficiton dum 1974. La kostoj tamen konstante kreskas kaj la estraro proponis altigon de la kotizoj: kluba membro 20 krj, junula 15, familia 10, rekta membro kun gazeto 30 kaj junula membro kun gazeto 15. La jarkunveno unuanime akceptis la proponon, kaj la novaj kotizoj validos ek

JARKONGRESO 1975

de 1976. Sufiĉe multe ni diskutis pri la novaj statutoj, kiujn oni tamen akceptis. La estraranoj estis reelektataj.

Instrukciaj kursoj por kursgvidantoj

Inter la proponoj al la jarkongreso troviĝis unu, ke la estraro esploru la eblecojn aranĝi instrukciajn kursojn por kursgvidantoj (-ontoj). Sören Sandqvist akcentis, ke kursojn por gejunuloj prefere gvidu gejunuloj. Sed se ne troviĝas junulo kiu volas/kapablas gvidi kursojn?

Oni diskutis denove — kiel plurfoje antaŭe — pri sindiko de SEF. Olle Olsson proponis libervolan deĵoron, kaj Rolf Nordström atentigis, ke en Danlando junuloj, kiuj deziras fari senarmilan soldatservon, povas ricevi permeson labori dum la stipulita tempo en la esperantomovado. Curt

Alf kredis, ke oni povas ricevi helpon de AMS (ŝtata aŭtoritato por la labormerkato) en certaj kazoj. Oni komisiis al la estraro plue esplori la aferon.

Ekskurso kaj diservo

Same kiel pasintjare la ekskurso okazis en la posttagmezo de la pentekosta tago — post la jarkunveno de SEF — kaj ĉi-foje oni veturis per aŭtobusoj al Tylösand kaj trinkis kafon en Tylöhus. La vetero estis brila kaj la tempo sufiĉis ankaŭ por promeno tra la malnova, bone konservita parto de Halmstad. Kelkaj estus volonte vidintaj la faman Miniland. Sed ĉiu jarkongresa ekskurso estas elekto inter diversaj eblecoj kaj la tempo ĉiam pasas tro rapide.

En la vespero multaj kongresanoj partoprenis diservon en esperanto en



LJK kun la prezidanto de SEF.

Redaktoro:

La longa, bela somero — almenaŭ en suda kaj meza Svedujo ĝi estis kaj longa, varma kaj bela — estos je la fino kiam vi ricevos tiun ĉi numeron de La Espero.

Kelkaj legantoj plendis pro la longa tempo, kiu pasis inter la apero de nro 3 kaj nro 4. Sed tiu longa interrompo fakte ne nur dependas de la redaktoro. Kiel vi scias, Svedujo estas "fermita" dum julio. Preskaŭ ĉiuj libertempas, tiel ankaŭ niaj presistoj. Ĉar ni ne povas eldoni pli ol ses numerojn ĉiun jaron, ni preskaŭ devas aperigi tri numerojn dum la unua duonjaro. Kaj tiam la kvara numero povas aperi nur en la fino de aŭgusto, kaj se io neatendita malhelpo aperas, ekz. malsano de la kompostisto kiu ĝenerale laboras pri nia gazeto povas okazi eĉ pli longa prokrasto.

En tiu ĉi numero vi trovos — se nia finaranĝanto ne ŝanĝos tion — sufiĉe multe da recenzoj. Ni scias, ke iuj legantoj opinias, ke ni havas tro da recenzoj. Nun, en la plej antaŭaj numeroj mankis la recenzoj, kaj tiam plendis la eldonistoj, kiuj intertempe sendis al ni siajn eldonaĵojn.

Sed, kio estas recenzoj? Io sen-interesa kaj seka? Ili ne devas esti. Bona recenzisto devas redoni iom el la enhavo de la koncernaj verkoj, tiel ke la recenzo mem fariĝu ĝuinda por la leganto. Ĉar mankas al ni spaco, kelkaj el niaj recenzoj tamen fariĝas mallongaj — nuraj mencioj pri eldonitaj libroj. Sed eĉ tiuj devas servi al niaj legantoj kiel gvidiloj, kiam ili aĉetas librojn. Ĉar tion vi faras, ĉu ne?

Ĉar ni estas je la komenco de nova studsezono ni eble denove atentigu pri la graveco de **legado**. Povas esti ke vi ne legas multe da svedlingvaj libroj — multaj homoj bedaŭrinde preferas la televidon — sed, kvankam ni ankaŭ tion bedaŭras, tio tamen ne estas tute tiel grava. Ĉar vi vivas ĉiutage kun la sveda lingvo, vi ĝin lernis ek de la fruaj infanjaroj, vi ĝin parolas, aŭskultas, legas gazetojn, afiŝojn, reklamilojn. Esperanton vi uzas parole nur kiam vi renkontas esperantistojn, kaj nur tre malmultaj faras tion ĉiun tagon. Ne nur por lerni la lingvon, ankaŭ por konservi viajn sciojn, vi devas uzi ĝin. Kaj i. a. vi devas legi. Nur tiel vi akiras la kapablon esti la lingvon ankaŭ parole. Nur tiamaniere ĝi fariĝas por vi vivanta lingvo. Ne forgesu instrui tion al la komencantoj!

Ake Blomberg

Jarkongreso 1975 (daŭrigo)

la tute nova, antaŭ nelonge inaŭgurita preĝejo de Vallås. Predikis pastro Gunnar Edberg, pli frue paroĥestro en Barsebäck.

La virino en la esperantista literaturo

estis la ĉeftemo por la distra vespero en tiu pentekosta tago. Sven Alexandersson tenis la fadenojn en siaj manoj, kaj lin helpis Franko Luin kaj Märtha Andreasson. Salex respondecas por la "Virina rapsodio" — kiun ni aperigas aliloke en tiu ĉi numero — kaj por la traduko de la fama Bellman-poemo "Ulla, ho Ulla". Kantkaj muzikgrupo de ses personoj ankaŭ kontribuis al la bona programo de la vespero. Salutoj al la jarkongreso alvenis de pluraj personoj, i. a. de la prezidanto de UEA.

Kiel oni akiras membrojn kaj konservas ilin

Pri tio oni diskutis en la pentekosta lundo. Märtha Andreasson enkondukis, sed montrigis, ke ŝi tute ne intencas instrui al la kongresanoj la ĝustan manieron. La celo estis, ke la partoprenantoj, en apartaj laborgrupoj mem diskutu pri la problemoj, raportante pri sukcesaj manieroj uzitaj kaj trovante novajn ideojn. Jen kelkaj opinioj:

Broŝuroj de SEF estas la plej malmultekosta informmaterialo. 2 000 faldfoliojn oni povas akiri por 30 kronoj. Pensionuloj la plej forte interesiĝintaj. Parolu esperanton kiel eble plej multe. Stokholmo (la klubo) donas stipendiojn al la kursanoj.

Prelegu ĉe skoltoj, ĉe instruistoj, ĉe politikaj partioj, en virinaj organizaĵoj, en pacorganizaĵoj. Utiligu la studorganizaĵojn.

Unu propono ŝajnas al ni speciale interesa: por havi eksterlandajn vizitantojn kelkaj familioj en unu loko povus inviti alilandajn esperantistojn je senkosta loĝado kaj — almenaŭ malmultekosta — manĝado dum certa mallonga tempo. Ĉiuj samtempe. Tiel oni povus havi kvazaŭ internacian minikongreson en unu loko. Certe ankaŭ eblus por pluraj, najbaraj kluboj kunordigi tian aranĝon.

La instruisto

ankaŭ havis sian jarkunvenon en la kadro de la jarkongreso. La nuna kasisto Gustav R. Johansson ekis kaj Dora Andreasson fariĝis nova kasisto. La membrototizo por 1976 estas 5 kronoj. La prezidanto Olle Olsson raportis pri la komitata kunveno en Parizo kaj pri vizito en la oficejo de UNESKO en Parizo.

Skellefteå sekvontjare

En 1976 ni veturos norden. La jarkongreso okazos en Skellefteå kie

Nova ĉefo de la eldonejo

En kunligo kun la jarkongreso en Halmstad okazis la jarkunsido de Eldona Societo Esperanto.

La ekonomia raporto montris, ke aktivoj kaj pasivoj bilancis je krj 70.552:01 la 31/12 1974. La enspezoj atingis al preskaŭ 35 mil kronoj, kaj la gajno malnete (svede: brutto) estis por 1974 23 mil krj, nete (post varimposto, sendkostoj, salajroj ktp) 4.418:87. Oni akceptis la proponon de la estraro aldoni al la propra kapitalo la gajnon kaj ne disdoni iun dividendon.

La granda tasko de la eldonejo nun estas la eldono de nova sved-esperanta vortaro. La malnova eldono nun preskaŭ tute elĉerpigis kaj la sveda esperantistaro sendube deziras novan vortaron, sed en la nunaj cirkonstancoj kun rapide altigantaj preskostoj la eldono de tia verkaĵo ne estas facile solvebla problemoj. La libervola kolektado por la vortaro atingis la sumon de 14 mil kronoj, sed multe pli estas bezonata.

Je la elektoj okazis gravaj ŝanĝoj, ĉar la prezidanto ek de 1958, Sven Sjöblom ekis el la estraro, same kiel la estrarano Karin Strandberg, Novelektigis Ake Blomberg, la redaktoro de La Espero, kaj Sune W. Ahlm, prezidanto ĝis 1958. La intenco estas, ke Ake Blomberg fariĝu nova prezidanto. Por la regula funkciado de la eldonejo la ŝanĝo ne havos iajn sekvojn: la sidejo restos en Malmö kaj la ekspedejo daŭre prizorgos s-ino Anna-Greta Ströme. Sven Sjöblom, kiu loĝas en la sama domo kie troviĝas la ekspedejo, ankaŭ promesis daŭre kunhelpi en certaj rilatoj.

Jan Ströme, kiel reprezentanto de SEF, dankis al Sven kaj edzino Britta Sjöblom pro multjara sindona laboro kaj transdonis libron. La jarkunsido ankaŭ decidis esprimi varman dankon al docento Ebbe Vilborg pro lia multjara sindona laboro pri la manuskripto de la nova vortaro.

samtempe okazos la internacia kongreso de la esperantistaj fervojistoj. Ĉiuj kongresanoj per fortaj aplaŭdoj substrekis la dankon de la prezidanto de SEF, Jan Ströme, al la komitato en Halmstad, kiu per forta laboro tre bone sukcesis.

Ĉar bi mem ne havis eblecon partopreni la jarkongreson — mi troviĝis en Usono je tiu tempo — mi fine volas konfesi, ke tiu ĉi raporto estas farita el raportoj de diversaj aliaj personoj, ĉefe de Oskar Svantesson en lia gazeto MUNDO.

Ake Blomberg

Virina rapsodio

**Prezentita dum la SEF-kongreso
en Halmstad 1975**

*La viro de la ŝtonepoko
virinon trenis je la haroj.
Por nuntempulo estus ŝoko
similaj malĝentilaj faroj.*

*En romantika periodo
liuton portis trubaduro
por bele kanti laŭ la modo
pri amoroza aventuro*

*Kun parlamenta evoluo
ja sekvis ardaĵ kvereletoj
kampanjon pri virininfluo
direktis bravaj sufraĝetoj.*

*Egalrajteco inter seksoj
la politika kvintesenco
kaj solvo de virinkompleksoj
— sed tamen restas diferenco!*

*Pioro: pola rakontaro
atingis nin el transmarflanko
virinoj en la ŝipo Aniaro,
pri ĉio ĉi rakontos Franko.*

*En Gösta Berling ni renkontas
virinon en Virtaskoj lerta
pri fortaj vortoj ŝi ne bontas
aŭskultu kion legos Märtha.*

*La svedan poemaron pie
tradukis Magda Carlsson-Bobman.
La versoj fluas harmonie
ŝi majstris sian ilon pluman.*

*Marjorie Boulton estas stelo
sur esperanta firmamento
en poezio la modelo
pri lingva elokvento.*

*Kun Bellman montros mi adoron
per kiso sur virina mano.
Per kanto portos mi honoron
al la plej dolĉa estrarano.*

*Egalrajteco por virino
jen solvo de virinkomplekso.
Programo venis nun al fino.
Humile dankas vin Salexo.*

Salex en majo 1975



La Kongresejo.



Ekskurso al Työsand.



Sargitaj estraranoj, Ulla kaj Franko.

läst & hört

Sångfestivalens språk

I en insändare i VLT (1 april) skriver Siri Bartusch om språket i sångfestivalen: "Här i landet tycker vi att det är naturligt att man i italienska filmer talar italienska, i ryska filmer ryska osv. Vi börjar också alltmer förstå hur viktigt det är att invandrare får behålla kontakten med sitt modersmål.

Denna beredvillighet är givetvis lovvärd, men rimmar illa med den anspråkslösa hållning vi ofta intar vad gäller vårt språk."

Hon kommenterar också att "det internationella språket esperanto är ett alternativt språk vid kontakt över gränserna."

Enkät om esperanto

Västerås-klubbens enkät om gemensamt andraspråk presenteras av VLT (3 maj) under rubriken "Engelska lämpligast", men i artikeln framgår ändå att 40 procent av de tillfrågade tyckte att esperanto borde bli andraspråk världen över.

Tidningen upplyser också att de flesta av de tillfrågade ansåg att det berodde på dålig information om språket, att esperanto inte blivit mera allmänt.

Danska eller esperanto

"Sam" i Dagbladet, Sundsvall, berättar i sin spalt (30 april) om ett samtal med en dansk, som hälsar på ibland: "Jag är lessen, sa jag, jag förstår inte danska så bra. Vill du tala lite saktare. — Men jag talar ju svenska! sa han, aningen irriterad över mina bristande fattningsförmågor.

Vi kanske i fortsättningen skall konversera på esperanto."

I sommar

Ur La Espero har Söderhamns-Hälsinge-Kuriren hämtat uppgifter för en artikel av "Kogo" (19 april) om esperantoarrangemang i sommar. Om den norska kongressen i Tromsø tillägger han "Nordkalotten med sina fagra scenerier kommer säkert att locka många icke-norska esperantovänner, först och främst från grannländerna Sverige och Finland. En mindre grupp från Söderhamns-trakten har t. ex. redan anmält sig."

80 år

"Hon kan femton språk — men håller styvt på esperanto!"

Ebba Persson i Helsingborg fyllde 80 år den 18 april och hedrades med en artikel i Arbetet. Hon följde med G. H. Backman redan 1909 på skolresa till Tyskland, efter en kurs i esperanto.

Årskongressen

Hallandsposten har informerat vid flera tillfällen om årskongressen i Halmstad.

"Ett neutralt språk är av betydligt större värde som världsspråk, enär ingen nation särställes eller missgynnas", skriver man i en artikel om språket esperanto (11 april).

Årskongressen i Halmstad blir kanske "en påminnelse om att esperanto existerar — eventuella rykten om dess död är sålunda betydligt överdrivna" skrev Valfrid Göransson (25 jan.).

Lie ironi kostar tidningen på sig på öppningsdagen (17 maj). Efter en läsövning på esperanto lägger man till "Not so bad, what?".

"Vi måste informera mera om esperanto", är rubriken på Hallandspostens rapport från årskongressen (20 maj). Det är Gunnar Tengling i Halmstads Esperantoförening som intervjuas.

Hallands nyheter rapporterade också från årskongressen (20 maj). "Inför esperanto som andraspråk i skolorna!" lyder inledningen, och det är ett citat från Jan Ströme, ordförande i Svenska Esperanto-förbundet.

Arbetet har också haft en liten artikel om årskongressen. "Utvecklingen av Esperanto går sakta men den går åt rätt håll", säger esperantisterna i Halmstad till tidningen.

Ulla Luin

Kurder

Turkiet är det land där det bor flest kurder — uppgifterna varierar mellan 5 och 7 miljoner. Människorna i Çiya är kurder. Man har ett eget språk, helt olika turkiskan, man har en egen historia, en egen kultur. Det är det som oroligheterna i Kurdistan alltid handlat om — det kurdiska folkets rätt att skapa sig en egen nation där man fritt kan få tala och sprida sitt språk och sin kultur.

DN 5 maj 1975

Invandrarbarn

Vi flyttade hit för 1½ år sedan. Det var höst när vi flyttade och vi skulle börja skolan. Först började jag läsa svenska, sedan började jag i klassen.

Jag kan inte riktigt tala svenska, jag blandar ihop alla ord. Det är bra att vi i skolan har finskspråkig undervisning. Annars skulle det inte gå.

Ur intervju i Arbetet 6 maj 1975

Quechua officiellt språk

Första tidningen på quechuaspråket har nu kommit ut i Peru. Detta inkaspråk blev den 27 maj tillsammans med spanskan officiellt språk i Peru. Namnet på tidningen är Revolutionen talar genom tidningen.

DN 5 juni 1975

Utrikiska

Man vill ge invandrarverket 400 000 kr. att fördelas som stöd till tidningar och tidskrifter på "utländskt språk" som ges ut av invandrar- och minoritetsgrupper. Det gäller bl. a. finska tidningar. Finska är emellertid ett sedan urminnes tid inhemskt språk i norra Sverige.

D. Schwarz i DN

Ett språk i Afrika

Den nigerianske författaren Wole Soyinka — en av det moderna Afrikas mera kända poeter och dramatiker — vill införa ett gemensamt språk för hela den afrikanska kontinenten.

Vilket av Afrikas många språk som skulle bli den svarta kontinentens eget har inte sagts, men Soyinka själv tänker sig swahili.

Enligt Jeune Afrique,
i Veckans Affärer
5 juni 1975

Internationalisering

UKÄ:s falska internationalisering innebär att kunskaper och böcker hålls tillgängliga på språk som inte är förstäligen för den stora majoriteten av detta folk. UKÄ:s internationalisering är således samma gamla latinskola som förr.

Jan Myrdal i Kulturfront nr 9, 1975

Ulla Luin

INFÖR HÖSTENS KURSER

STARTA OM MÖJLIGT FLERA OLIKA SLAGS KURSER!

Tag kontakt med någon studieorganisation på orten och utnyttja de fördelar man därigenom kan få!

Förslag till material i NYBÖRJARKURS:

ALLAS ANDRA SPRÅK

ESPERANTO (E. Malmgren) 9: 40
Välkänd, lättanvänd, omväxlande och roande lärobok, speciellt gjord för kurser. Läraren kan helt följa läroplanen.

★

ESPERANTOKURS

(F. Lindén) 10: 60
Mera omfattande lärobok med utförliga grammatiska förklaringar. Särskilt användbar i kurser, där deltagarna önskar ingående studier i Esperanto eller har tidigare språkundervisning. Denna lärobok kräver mer förarbete av läraren.

★

ESPERANTOKURS PER POST

Korrespondenskurs (10 brev) 15: --
Instruktiv, lättfattlig, intressant. Går utmärkt att använda som kursmaterial. Kursdeltagarna sänder då gemensamt in lösningarna till Esperantoförlagets rättare och sparar därigenom en hel del porton. En kunnig kursledare kan naturligtvis även själv rätta lösningarna. Meddela vid beställningen vilket sätt som kommer att användas.

★

INTERNACIA ELPAROLO

Uttalsskiva med texthäfte .. 7: 65
Modern 33-varvs grammofonskiva, intalad av flera kända internationella röster. Bra hjälp i en nybörjarkurs för inlärandet av rätt uttal.

★

KORRESPONDERA MED HELA VÄRLDEN

(R. Pehrsson) 2: 35
God hjälp och ledning för en nybörjare. Exempel på brevformulering från enkla hälsningar till mera avancerad skriftväxling.

KORRESPONDENSANNONS

förmedlas av Esperantoförlaget i internationell tidn. (Heroldo) 14: --
Sådan annons kan sättas in redan efter någon månads kurs. Eftersom det sedan dröjer ungefär en månad innan tidningen med annonsen kommer ut, kan kursdeltagare vid den tidpunkten mycket väl föra en enkel korrespondens, t. ex. per vykort. Detta stimulerar och ger bevis på Esperantos användbarhet.

★

LILLA ORDBOKEN

(E. Vilborg) 14: 10
Behändig och modern Svensk-Esp. och Esp.-Svensk fickordbok.

★

ESPERANTO-SVENSK ORDBOK

(P. Nylén) 18: 80

★

EL LA VIVO DE ZAMENHOF

(G. Henriksson) 3: 25
Dr Zamenhofs ungdom skildrad i enkla fraser just för nybörjare. En "obligatorisk" bok för alla kursdeltagare.

Förslag till material i FORTSÄTTNINGSKURSER:

Delar av nybörjarkursen bör snabbrepeteras

Därefter kan man noggrant genomgå:

SVENSK ESPERANTO

GRAMMATIK (E. Carlén) .. 17: 65

★

PASOJ AL PLENA POSEDO

(W. Auld) 21: 75
Övnings- och lärobok för högre studier med bl. a. fem språkövningar. Speciellt gjord för inlärandet av internationell stil.

Dessutom bör en intressant bok läsas och diskuteras.

Boken skall väljas efter kursdeltagarnas förkunskaper.

Vi föreslår:

VIVO VOKAS (S. Engholm) 11: 75
En originalroman om ungdom på utomordentlig Esperanto, lätt men perfekt språk. Den mest använda boken för fortsättningskurser.

★

LA GRANDA AVENTURO

(F. Szilagy) 11: 75

INTER SUDO KAJ NORDO

(F. Szilagy) 11: 75

Båda novellsamlingar i författarens livliga och ofta humorfyllda stil.

★

AMUJAJ DIALOGOJ EN ESPERANTO

(A. Lienhardt) 10: 90
En ny sorts läsebok med gradvis ordnade dialoger i enkel stil för att få eleverna vana vid vanligt samtal.

★

JAROJ SUR TERO

(L. Sinha) .. häft 14: 10, inb. 18: 80
Självbiografi om författarens barndom och ungdom i Indien och studieår i Sverige, och slutligen om livet som vuxen i Indien. Mycket god och lärorik Esperanto.

★

MIRINDA ELIKSIRO

(J. H. Rosbach) 11: 45
14 noveller om det som kallas mänsklig lycka... Stilen är elegant och lättflytande, och även relativt nya Esperantister kan med nöje läsa den.

För övrigt är alla Esperantoförlagets utgåvor lämpliga som kursläseböcker. Dessutom kan kursledare och lärare själva välja ut vad som önskas i UEA:s årsbok, boklistan. Vi skaffar allt, även om det numera ibland dröjer något innan vi får in det.

★

MOMS ÄR INRÄKNAD I OVANSTÄENDE PRISER.

ESPERANTOFÖRLAGET

Fack 200 42 MALMÖ Postgiro 578-5

TROMSØ

Glacimara kongreso sub noktomeza suno

Norvega Esperantista Ligo aranĝis sian jarkongreson 1975 en Tromsø 4—7 julio, urbo kies nomo sonas arkтика kaj eĉ iomete ekzotika ankaŭ por multaj skandinavoj. Kvankam la vojo tien estas tiel longa por la plimulto de vojaĝantoj, tamen tie kolektiĝis konsiderinde pli ol cent partoprenantoj el diversaj partoj de Eŭropo, tiel ke la norvegaj membroj mem fakte riskis iĝi minoritato.

Inter aliaj vojaĝantoj ni estis kvar personoj el la suda parto de Helsinglando, kiuj entreprenis aŭtoveturon norden al tiu operacia bazo de tiom da ekspedicioj al la Norda Poluso — Nansen, Amundsen, Nobile ktp. La konsiderinda distanco ĝis "la norda kaloto" for de nia hejma regiono en la mezo de Svedujo kaj la ampleksa etendiĝo de la skandinavaj landoj sur la mapoj speguligis en la fakto, ke ni bezonis kvar tagojn kun sufiĉe moderaj tagetapoj tra Haparanda kaj Muonio, Finnlando, por atingi nian vojaĝocelon.

Alveninte tien ni povis tuj konstati, ke ĝis nun estis tre nebuleca nia koncepto pri ĉi tiu urbo, pri ĝia loĝateco kaj loĝantaro, pri ĝia rapida evoluo kaj la vivo ĝenerale kaj pri la klimato sur ĉi tiu norda latitudo.

Jes — la klimato! El kvar tagoj en Tromsø pluvis pli-malpli intense dum tri, sed la kvara tago prezentis aprobeblan veteron por tuttaga ekskurso. La urbanoj konkuris rakonti al ni, ke tiel malbonan veteron someran oni ne vidis dum la lastaj 25 jaroj, kaj vintre okazis nur malofte, ke la termometro montris froston pli akran ol 15 centigradoj. Nu la noktomeza suno do sin kaŝis efike kaj definitive malantaŭ pezaj nuboj, tiel ke laŭplana montlifita veturo por rigardi la fenomenon devis tute nuligi.

Sed ni tamen tute ne "sidis en la maro", eĉ se ŝajnis, kvazaŭ ĝi falus sur nin de supre. La Tromsøa Esperantoklubo "La Norda Lumo" kun

siaj energiaj klubanoj, gvidata de la instruisto Herolv Olsen, nome per siaj granda kuraĝo kaj progresema spirito tre bone sukcesis en sia strebado doni al ni ĉiuj alvenintoj riĉan gajnon de nia restado en ilia bela urbo. Ĉi tiu cetere surprizis niajn difuzajn ideojn, prezentante agrablan mikson de malnova sed tre bele konservata domaro kaj modernegaj konstruaĵoj, kiel ekz-e la rimarkinda t. n. "Glacimara Katedralo" kun ĝiaj blankaj, lamenosimilaj muroj.

La eble iom aŭdaca invito de l'Esperanta klubo — jam frue dissendita — do ne eliris neaŭdite, ĉar alvenis al Tromsø partoprenantoj ne nur el la sudaj partoj de Norvegio plus Svedujo kaj Finnlando, sed jen estis reprezentata tuta vico da eŭropaj landoj: Danlando, Germanujo, Pollando, Nederlando, Belgio, Francujo, Hispanujo kaj Italio — entute 11 landoj. Eĉ el orienta Eŭropo kaj el Usono venis aliĝoj, sed tie oni devis rezigini la vojaĝplanojn.

La programo enhavis kompreneble kutimajn traktadojn de jarkunsido, kiam i. a. la prezidanto de N. E. L., prof. Carl Støp-Bowitz, reelektiĝis. Poste prelegis d-ro Werner Bormann el Hamburgo pri la landaj asocioj kaj ilia agadkampo. Demandoj, kiujn diskutis la NELanoj, estis kiamaniere interesigi la norvegajn radion kaj televidon pri Esperanto kaj solidareco kun la lapanoj en ilia batalo por egalrajteco kun la cetera loĝantaro. Ambaŭ aferoj kondukis al unuanime akceptitaj rezolucioj prezentotaj al la koncernaj aŭtoritatoj.

La maljuna esperanto-veterano norvega, kapitano Rolf Bugge-Paulsen, Oslo, nun elektiĝis **honora prezidanto** de Norvega Esperantista Ligo. Tion li certe meritas, ĉar kune kun Vilho Setälä en Finnlando kaj Theodor Juhlin en Svedujo li apartenas al la vere honorindaj pioniroj de la esperantomovado en la nordaj landoj.

Okazis agrabla festbankedo kun balo en la moderna kaj plaĉa Saga-hotelo, kie prezentigis muziko kaj popoldancoj de profesiaj artistoj lokaj. Tuttaga rondveturo en la montegaraj ĉirkaŭaĵoj de Tromsø estis aranĝita al Lyngenfjord, kaj tiam la aranĝantoj fakte sukcesis tuŝi la koron de l'veterdijoj, ke ili konduitu pli dece. Unu vespero dediĉigis al muziko, kantado kaj paroloj, kiam la kongresanoj mem laŭpove kontribuis al la amuzprogramo — kaj fakte tie sin prezentis neatendite granda nombro da talentuloj bonegaj sed ĝis tiam nekonitaj. Pro la multo de naciecoj kaj kulturregionoj reprezentataj repertuaro fariĝis varia kaj multfaceta.

Ĉu ekzistas ordenoj en Esperantujo? Jam antaŭ deko da jaroj mi konatiĝis kun la fakto, ke almenaŭ en Norvegio oni trovas ordenon de esperantistoj. Kaj nun la sama ordeno aranĝis solenan enmarŝon en verdaj roboj kaj ĉapoj, la ĉefo portante steloĥavan migrobaston, kaj kun aliaj similaj signoj eksteraj de ĵurligita ordena aktiveco. Ĉu Norvegio estas unika en tiu rilato? Ĉiuokaze jen nekutima, sed soleneca, kolorforta programero, kiu kreis sian propran etoson.

Post la kongresfino estis okazoj por tiuj, kiuj dezirus, aĝi al ekskursoj pli longaj, i. a. al Norda Kabo kaj Svalbardo, kaj almenaŭ la unue nomita loko allogis certan nombron da partoprenantoj.

Sed ni helsingoj preferis turni la nazon hejmen, kaj iom post iom tra Narvik kaj la bonega, nov-inaŭgurita "arĝenta vojo", nun en hela sunbrilo kaj bonvena somervarmo, ni venis al niaj loĝlokoj ĉe la suda marbordo de l'Botnia Golfo.

Ni sumigas kaj rekomendas: al la tre interesa, vidinda norda Norvegio kun ĝia rava naturo montegara oni povas vojaĝi, ne sciante Esperanton nek aliajn lingvojn fremdajn, ĉar la idiomo en tiu landparto estas facile komprenebla por ni svedoj. Sed la Internacia Lingvo donis al ni multe da plezuro kaj utilo por kontaktoj kun ĉiuj aliaj fremduloj alvojaĝintaj.

Agu kiel ni: vojaĝu kaj lernu!

Karl Gustafsson

REZOLUCIO

Norvega Esperantista Ligo, okaziginta landan kongreson en Tromsø de la 4. ĝis la 7. de Julio 1975, esprimas sian solidarecon kun la lapanoj en ilia batalo por egalrajteco kun la cetera loĝantaro. La Esperanto-movado ĉiam pledis por tio, ke ĉiu etna grupo havu la oportunon disvolvi sian propran kulturon. Ĉi tiu principo ankaŭ estas fiksita en la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj, kiun Norvegujo subskribis. Norvega Esperantista Ligo tial petas, ke oni ebligu al la lapanoj evoluigi sian kulturon laŭ siaj propraj deziroj.

Universala Ligo

En Hago, Nederlando, okazis la 31-an de majo 1975 membrokunveno de la restarigita Universala Ligo.

La prezidanto, s-ro H. J. Hendriksen bonvenigis la ĉeestantojn. Specialan vorton de bonveno li direktis al la ĉeestantaj membroj el la eksterlando: s-ro Tiberio Morariu el Svedujo kaj s-ro P. De Smedt el Belgujo.

El la laŭtlecita financa raporto evidentiĝis, ke la enspezoj dum la periodo de majo ĝis fino de decembro 1974 estis proks. 200 guld. malpli altaj ol la elspezoj en tiu periodo. Tamen tiu deficiton ne povis kaŭzi maltrankvilecon ĉar en la komenca tempo de la nova aktiveco de Universala Ligo estis necese sendi multajn centojn da provokzempleroj de la Bulteno por varbi aktivajn membrojn por la revivigita Universala Ligo. Ĉi tiuj elspezoj estis unufojaj kaj celis denove havigi al la movado kiel eble plej baldaŭ sufiĉe firman bazon.

Nun la Universala Ligo denove havas siajn adeptojn en 25 diversaj landoj. Proks. la duono de la nombro de la membroj troviĝas en Nederlando, kie ili estas disigitaj en 32 diversaj urboj, urbetoj kaj vilaĝoj.

La plua kresko de la membraro dependas nun ĉefe de la "aktivaj" membroj, kiuj povas peti al la Centra Oficejo sendi provokzempleron de la Bulteno al esperantistoj, kiuj (verŝajne) interesiĝas pri la idealoj de la porpaca movado de U. L. Dum la kunveno la estraro donis ekzemplojn pri la sukcesoj, kiujn kelkaj vere "aktivaj" membroj akiris per siaj klopodoj varbi adeptojn por nia movado.

La prezidanto petis al du ĉeestantaj membroj kontroli la envenintajn voĉdonilojn. La rezultato de la kontrolo estis, ke la jenaj kandidatoj estas elektitaj kiel aldonaj anoj de la Internacia Generalestraro de U. L.: S-ro P. De Smedt el Belgujo, D-ro W. P. Roelofs el Nederlando, S-ro Tiberio Morariu el Svedujo, Dro J. Kontor el la FR Germanujo, S-ro Ramon Molera Pedrals el Hispanujo, D-ro J. Hamvai el Nov-Zelando.

La prezidanto bonvenigis la novajn anojn en la Internacia Generalestraro.

En la dua parto de la kunveno s-ro Andreo Cseh rakontis kelkajn interesajn okazaĵojn el la komenca

tempo de sia aktiva laboro por la Esperanta movado. I. a. li skizis en tre sprita maniero, en kiu situacio li konatiĝis kun sia samlandano s-ro Tiberio Morariu, kiu komencis sian studon de la Esperanta lingvo en kurso, kiun s-ro Andreo Cseh gvidis en Rumanujo. Siaflanke s-ro Tiberio Morariu ankaŭ rakontis ion el siaj travivaĵoj en tiu frua periodo de sia fervora laboro por la diskonigado de Esperanto.

La ĉeesto de du tiaj internacie famkonataj esperantistoj en la membrokunveno efikis, ke nur dum malgranda parto de la membrokunveno regis la neevitebla seka laborsfero, sed ke plejofte aŭdiĝis variaj sonoj de entuziasmo pri la idealoj de la Esperanta movado ĝenerale kaj de la porpaca movado de Universala Ligo pli speciale. (Ekz. UEA estas la kapo kaj UL la koro de la E-movado.)

Ĉe la fermo de la kunsido la prezidanto povis konkludi, ke ĉiuj certe estas kontentaj, ke ili ĉeestis ĉi tiun bone sukcesintan kaj tre interesan kunvenon. Li esprimis la esperon, ke la sukceso de la membrokunveno de UL instigos la membrojn veni ĉiam pli grandnombro al ĉi tiuj renkontoj de pacamantoj kaj por paco laborantoj.

C.M.N.T.Op't Roodt

Sätt igång!

Du vet att esperanto är ett lätt språk. Men visst kan man göra det lättare! Med en bra lärobok, t. ex. Fråga efter EK! Den är gjord för dig som vill läsa i din egen takt. Med EK! blir du lärare åt dig själv.

esperanto

ek!

Lär dig lite esperanto

EK! - Självinstruerande lärobok i esperanto Utgiven av Esperantoförlaget, Fack, 200 42 Malmö 7

ek! Läroboken för självstudier finns i bokhandeln och kostar c:a 28:50. Naturligtvis också direkt från Esperantoförlaget, Malmö.

Vizitu Finnlandon

La Aŭtunaj Tagoj de Esperanto-Asocio de Finnlando en Kuhmo la 27an kaj la 28an de septembro 1975.

En sia jarkunveno en februaro decidis EAF, ke unuan fojon okazos la Aŭtunaj Tagoj en malproksima kampara komuno kia Kuhmo estas.

Jam de kelkaj jaroj Esperanto-movadeto videblas en Kuhmo, kaj la 21a de aprilo vidis naskiĝon de "Verda Astroïdo", Esperanto-Klubo de Kuhmo. Kvankam ni estas malmultaj, ni kuraĝe prenis taskon prizorgi la aranĝojn kaj ĝoje atendas kaj finajn partoprenantojn kaj eksterlandajn gastojn. Eĉ sinjoro Tonkin, prezidanto de UEA alvenos.

Krom vivantan esperantismen ni havas grandiozan naturon, nia hejmkomunumo ja situas apud la orienta landlimo, kaj kiel relative maldense loĝata regiono, ankoraŭ havas sufiĉe da spaco, arbaroj kaj pura akvo en siaj multnombraj lagoj, lagetoj kaj riveretoj.

En la nomo de kuhmoaj esperantistoj mi tiel volas vin saluti, karaj svedaj geamikoj! Estu bonvenaj al niaj Aŭtunaj Tagoj, sed se vi ne mem povos partopreni, bonvolu memori nin per poŝtkartsalutoj. Anticipe dankante

Maija Tähkävuori
Kuusamon koulu
887 40 Härmänkylä,
Finnlando

LA GEJUNULOJ

SEJU revekiĝis kaj aperigis ktp, en junio, nro 1/1975. Oni ne intencas reaperigi Kvinpinto'n. La ambicio tiam estis tro alta. "ktp" estos simpla sed aktuala informilo svedlingva.

La 20-21 de septembro la gejunuloj kolektiĝos en Södertälje por elekti novan estraron kaj diskuti pri la agado de SEJU en la estonteco. Oni loĝos en la junulargastejo Tvetagården, kaj la tuta kosto por manĝo kaj loĝo estos ĉirkaŭ 60 kronoj. Aliĝojn akceptas SEJU, Fack, 122 04 Stockholm-Enskede.

Oni deziras havi kontakton ne nur kun gejunuloj kiuj pretas tuj eklerni esperanton, sed ankaŭ kun aliaj, kiuj havas intereson pri internaciaj problemoj kaj lingvaj aferoj.

La laboro inter la gejunularo estas, laŭ nia opinio, absolute la plej grava de la esperantomovado. La "maljunaj" esperantistoj devas atente sekvi la laboron de la gejunuloj kaj doni al ili ĉiun eblan apogon. Kaj ne atendu, ke ili pensu kaj konduku precize kiel vi!

Ni certe bezonas freŝan, novan venton en nia movado. Sed, gejunuloj, ne nur diskutu kaj parolu, agu!

AB

ONI LEGIS KAJ TROVIS...

Sennacieca revuo, 24:a kajero (nova serio) 1975, eldonis S.A.T., Parizo, (67 avenue Gambetta, 750 20 Paris), prezo 9: — FF aŭ 2: — US \$.

En la esperanta gazetaro ne abundas periodaĵoj kiuj okupiĝas pri ideologio kaj idea debato. Krom sporadaj artikoloj en Revuo Esperanto kaj Heroldo nur la bedaŭrinde tro sporade aperanta organo de TEJO, Kontakto, sin dediĉas al la aktuala debato pri sociaj kaj filozofiaj problemoj. Jes, troviĝas aliaj esceptoj, kaj la religiaj periodaĵoj okupiĝas pri la apartaj demandoj de la religioj, sed ĝenerale la esperantogazetaro donas spacon ĉefe al movadaĵoj kaj organizaĵoj — bedaŭrinde ankaŭ al personaj disputoj kaj intrigoj — kaj al nia literaturo. Mi tute ne volas kritiki tion; la graveco de niaj organizaĵoj kaj agadaĵoj problemoj, konsidero al la neŭtraleco, manko da spaco, limigas la eblecojn de la redaktoroj. Sed eble nia gazetaro tiel fariĝas unuflanka, monotona, eble ĝi eĉ fariĝas seninteresa por multaj legantoj? Tiurilate la du periodaĵoj de S.A.T., la ĉiumonata **Sennaciulo** kaj la **Sennacieca Revuo**, kiu aperas nur unufoje ĉiun jaron estas kiel oazo en dezerto. Vere, ili estas socialistaĵoj, kvankam ne ekstrema maldekstraj, sed speciale Sennacieca Revuo havas altan kulturalan nivelon, kaj ĝia enhavo estas ĝuinda ankaŭ por tiu kiu havas alian opinion pri la politikaj kaj ekonomiaj problemoj ol la — plejofte — socialistaĵaŭtoroj.

La kajero por 1975 ne estas escepto. Ĝin enkondukas longa artikolo de Cor Bruins pri "Sennacieca kulturo". La rubriko donas ioma falsan imagon pri la enhavo, ĉar tiu artikolo ne estas speciale ligita al la idearo de S.A.T.; ĝi resumas la tutan kulturdebaton en nia socio, kaj eble speciale la idean evoluon de la esperantomovado. La aŭtoro unue faras konstaton — eble eĉ iom banalan — ke "La lernejo estas instituto nacia. Ĝi volas eduki la infanon al civitano de la lando. Por tio oni uzas la geografion, la historion, la muzikon, la literaturon k. t. p." La altkulturon — literaturon, muzikon, grandan arton — portas nur malgranda procento de la popolo, kaj eĉ pri ilia dediĉo oni povas dubi. "En la lernejo ili legas la verkojn de la grandaj poetoj. Hejme ili forgesas pri tiuj tedaj legaĵoj. Kiam ili forlasis la liceon kaj frekventas la universitaton aŭ prenas gvidan postenon en la socio, ili

apenaŭ legas gazeton." — "La socialista majfesto havas por la laboristaro egalan signifon, kiel la kristanaj festotagoj por la unuaj kristanoj. Ne ckzistas pli elokventa ekzemplo por la bezono de la amaso al simboliko, kiu estas ligita al la cirkla moviĝo de la jaro, ol la historio de la Majfesto." — "Ankaŭ esperanto estas deziro al perdita paradizo, la paradizo de homa kompreno, kiu forfalis, kiam en la antaŭa jarcento la industriigo kaj la nacia merkato disdividis la homaron en malgrandajn kaj malamikajn unuojn." Lasta citaĵo: "En niaj someraj universitatoj ni tro ofte paroligas homojn, kiuj prelegas pri sia fako. La samon ni povas aŭdi en nia propra urbo. Mankas preskaŭ ĉiam la ĝeneralaj, universalaj problemoj. — Mi esperas, ke la esperantistoj komprenas la tre gravan rolon, kiun esperanto povas ludi en la evoluo de sennacia, tuthoma kaj ĝuste pro tio individua kulturo".

Troviĝas ankaŭ artikolo pri Multatuli, la radikala aŭtoro de Maks Havelaar, kiu per sia verkaro antaŭ unu jarcento pliriĉigis la nederlandajn literaturon kaj lingvon. Marjorie Boulton rakontas pri tiu nova infanlibro — eble nova klasikaĵo, ĝuinda ankaŭ por plenkreskuloj — pri kunikloj. "Watership Down" (troviĝas ankaŭ en sveda traduko) kaj speciale atentigas pri la tute aparta helplingvo, la lingvo de la Heĝoj, kiun uzas la kunikloj.

Alia aktuala debatartikolo estas "Atomcentraloj: ĉu savaj, ĉu apokaliptaj?" Artikolo pri Hago, la ĉi-jara kongresurbo de S.A.T., kaj konciza artikoleto pri mona ekonomio finigas la riĉenhavan kajeron.

obo

Gizela kaj Roberto, 5 skeĉoj de Bukar. Eldonis Dansk Esperanto-Forlag. 32 paĝoj. Prezo ĉe Eldona Societo Esperanto: 5:25 inkl. imposto.

Dum la lastaj jaroj aperis en la esperantomondo kelkaj libretoj de skeĉoj kaj dialogoj kun sufiĉe seninteresa, malaltnivela enhavo. Tial oni unue tre skeptike malfermas la libreton de Bukar. Sed oni agrable surpriziĝas.

Ĉi tiuj skeĉoj ja estas amuzaj kaj bonaj. Ili estas prezentablaj je kiu ajn esperantokunveno, certe uzeblaj ankaŭ en kursoj por progresantoj. Ili ne bezonas multe da sceneja ekipaĵo, kaj la lingvo estas simpla kaj klara. Tre rekomendinda libreto!

obo

Else kaj Bo de Rigmor Christoffersen. Tradukis Gudrun Riisberg. Desegnaĵoj de Thora Lund. Eldonis Dansk Esperanto-Forlag. 40 paĝoj. Prezo ĉe Eldona Societo Esperanto, sv. kr. 5:80, inkl. imposto.

Mi dubas, ĉu tiuj naive simplaj rakontoj, kiuj ŝajnas aparteni al epoko jam delonge pasinta, tre interesas modernajn infanojn, kiuj legas "Kalle la Anaso" kaj aliajn seriojn. Sed mi, kiu atingis tute alian aĝon, fakte ĝuis la tre simplan tekston de la amuzaj historiotoj. Kial ne prezenti tiun libreton al niaj komencantoj kiel unua legaĵo? Ĝi havas ĉion, kion povas postuli komencanto: simpla lingvo, mallongaj rakontoj, bonhumora enhavo!

obo

Malfermu vian Biblion. Erland Sundström. Eldonis la Sveda sekcio de KELI. Prezo por svedoj 3:— krj. (KELI, Box 7, Östansjö, 694 02 Hallsberg).

Ĉi tiu libreto — 24 paĝoj, formato 10 × 14 cm — konsistas el du ĉapitroj el svedlingva enkonduka studgvidilo pri Bibliokono: Pri la Biblio, kiel rigardi ĝin, kaj El la Biblio, kiel kompreni ĝin. Ŝajnas, ke ili bone respegulas la opinionojn de la hodiaŭaj svedaj kristanoj, speciale de la liberekleziaj rondoj. Ĝuste la malgranda amplekso de la libreto, la konciza kaj klara lingvo, kaŭzas ke eĉ tiuj, kiuj ĝenerale ne dediĉas sin al sistema studado pri la Biblio, povas oferi tempon por tralegi la libreton. Tiel ili pli bone konatiĝas kun la opiniaro de la kristanoj, kiuj ja ampleksas grandan parton de nia popolo. Ili ankaŭ ricevas interesajn novajn konojn pri la Libro de la libroj.

obo

LA PLEJ SUKCESA PERFEKTIGA LERNOLIBRO

La tria eldono de "Paŝoj al plena posedo", la perfektiga antologia lernolibro de William Auld, eldonita de "Heroldo de Esperanto" en Prago, en kunlaboro kun Ĉeĥa Esperanto-Asocio, fariĝis unu el la plej vendataj libroj en la internacia lingvo. Fakte, ĝi estas la sola tiaspeca verko.

En 240 paĝoj ĝi instruas en 30 lecionoj, kun entute 180 lingvaj ekzercoj. Ĉiu leciono enhavas literaturajn: 18 originalajn kaj 12 tradukajn el samnombraj lingvoj. La literaturaĵoj apartenas al la plej bonaj Esperantostilistoj de Zamenhof ĝis Kalocsay, Szilagy k. a.

Ĉe Eldona Societo Esperanto, Malmö, la prezo estas 21:75 sv. kr. inkl. imposto.

Esploroj

Poemoj de Baldur Ragnarsson. STAFETO. Prezo ĉe Eldona Societo Esperanto, 18 sv. kr., inkl. imposto.

Por tiu ĉi poemaro la verkisto mem skribis la antaŭparolon. Vere pli bona gvidilo por kompreno de verko ol kiam aliulo faras ĝin. Li donas klaran kaj koncizan priskribon pri sia rilato al la poezio, eliranta de la tezo: "Por mi poezio estas esploro; kaj maniero kapti disfluantan senton por ĝin fiksi en spaco kaj tempo." Aparte interesas liaj provoj efektiviĝi tiun esploradon per helpo de la strukturaj eblecoj de la Esperanta lingvo, ĉefe vortkunmetoj, kiuj povas enhavi en si mem grandan signifoŝarĝon kaj en inteligenta maniero are uzataj donas flugilojn al la imagpovo de la leganto:

tuŝoj
duonkonsciaj direktiĝoj
laŭe

kalko blankdaŭras
dum mi tuŝas koordinate
indiferentan murnudon

kovroj koordinateblas

rezistas suboj
internaj malblankoj

tuŝimunaj

Kontraston al tiaj versoj formas alia tipo de tre koncentritaj versoj, kiuj foje memorigas pri pranorda poezio:

la veron serĉas
la poeto
per tiaj vortoj
servantaj
por lia dispono

Tiun lastan tipon Ragnarsson plurfoje miksas kun versoj de pli vasta amplekso, foje kun sukceso, foje kun malpli da sukceso. La ĵus citita poemado daŭrigas jene:

li eventuale
estas kontenta post finita tag-
laboro
miksiĝas en la rondon familian
petol-palpebras pompetaĵojn
aŭ senrezerve
deklamas
siajn lastajn poemojn

tiaj tamen
neeviteble instru-montras
ke li kultiv-nutru
klopode
pli altkvalitan memkritikon
en la estonteco

Ĉu la poeto sukcesas kapti tion, kion li celas, per tia ludo per lingvaj strukturaj? Mi trovis la poemaron facila legi, sed iom pli malfacila ĝuste taksii, ĉar foje la uzo de la lingvo vere spronis la imagpovon, foje la uzataj vortkunmetoj preskaŭ mortigis ĝin. Tamen estas tute evidente, ke la poeto estas survoje kapti per sia metodo ĝuste tion, kion li komence preparolis: disfluantan senton, senton sub aŭ malantaŭ la palpebla realeco, eĉ se li ne ĉiam tute sukcesas, ĉar

... la vivo diafana
fuĝas senhalte
inter la fingroj
de ekzisto forlasita

Ake Ahlrén

Ulla, ho Ulla

(FREDMANS EPISTEL NR 71)

C. M. Bellman

*Ulla, ho Ulla, mi volas proponi
ruĝajn fragetojn en lakto kaj vin
ĵiŝon saltantan mi povas aldoni
akvo el fonto oferas ja sin.
Krakas fenestroj pro venta vortico
floroj kaj branĉoj odoras nun
nuboj disiĝas en luda kaprico
jen la sun.*

Estas paradize. Verdas la kampar.

La vivo estas feliĉo:

*Jen fieraj trunkoj kiel gardostar
kun foliar.*

*La kvietaj lago sin etendas jen
kaj distance inter digo kaj kampeben.*

Estas paradize. Verdas la kampar.

Benita tag, benita tag.

Tradukis Salex
majo 1975

Halmstad en esperanto

Por la partoprenantoj de la jarkongreso en Halmstad, la urbo multobligis la tekston de sia turisma broŝuro kaj disdonis ĝin kiel aldonon al la broŝuro.

"Halmstad, la gaja urbo de liber-tempo" estas servema al la turistoj. En la enkonduko oni bonvensalutas la delegitojn, kaj aldonas: "Tiuĵ, kiuj deziras pliajn informojn estas kore bonvenaj al nia turistoficejo."

Do, restas nur kontakti ĝin: Halmstads turisttrafikforening, österbro, Box 47, 301 02 Halmstad.

Ulla Luin

Supplement till Svensk-Esperantisk Ordbok. Ebbe Vilborg. Utgivare: Esperantoförl., Malmö. Pris inkl. moms: 20: —.

Detta supplement har varit ute i endast några få månader, och i avsaknad av kompetenta recensioner citerar vi några meningar ur författarens förord: Ordförteckningen är avsedd att tjäna två syften. 1) Den skall fungera som ett supplement till Svensk-Esperantisk ordbok av Jansson—Lindén—Gerdman, utgiven 1934. 2) Den utgör samtidigt ett förstadium till den under arbete varande nya svensk-esperantiska ordboken och presenterar det nya material, som författaren avser att inarbete i detta. En stor ordbok är emellertid ett alltför allvarligt företag för att anförtros åt en enda man. Det är därför min förhoppning, att denna volym kommer i händerna på språkinresserade esperantister, som är villiga att föreslå förbättringar av de här framlagda översättningarna och påpeka brister och inkonsekvenser i ordförrådet.

Vi är villiga att i La Espero publicera sådana förslag och anmärkningar, som kan vara av allmänt intresse eller som kan föranleda diskussion, och vi tar därför tacksamt emot läsarnas åsikter om ordboken. Eftersom utgivandet av en ny stor svensk-esperantisk ordbok förhoppningsvis kommer att realiseras inom en inte alltför avlägsen framtid, är antalet exemplar av supplementet begränsat, så det gäller för intresserade att passa på.

AB

Ricevitaj Libroj

Lörjak: Neologisme

Fondumo Esperanto Helsinki 1975.
88 p. (ŝajnas esti humura romaneto).

Saĝa kapto de granda huzo,
redaktita kaj ilustrita de Du Vej.
(supozeble tradukita).

Fremdlingva Eldonejo, Pekino 1974.
34 p. kolore ilustrita. (Malmulte da teksto, kiu akompanas kolorajn desegnaĵojn).

Saotome katumoto: Danjo en Vjetnamio

Tradukita de membroj de Ikebukuro Esperanto-Societo, ilustrita de Endē teruyo. Eldonita de Ikebukuro E-Soc. 1974, 2-a eldono 1975 46 p.

Pollando nombroj kaj faktoj

Eldonejo Interpress, Varsovio 1974.
108 p. ilustrita.

AKTIVAJ KLUBOJ

Västerås — Familia festo

VEK — la juneca energia klubo en la granda urbo, kie ĝis antaŭ kelkaj jaroj ne troviĝis esperantosocieto — estas unika inter la svedaj kluboj ne nur pro ĝia vigla agado, sed ankaŭ pro la regula, entuziasma kaj interesa raportado al La Espero. Se la aliaj kluboj tiel raportus, nia gazeto estus tre interesa legaĵo por la aktivaj esperantistoj.

Bedaŭrinde ni ne povas redoni ĉion, kion ni ricevas el Västerås. Ni ne volas doni al niaj legantoj la impreson — certe malĝusta — ke troviĝas en Svedujo nur unu vere aktiva klubo. Ni esperas, ke tiu nia sinteno ne malkuraĝigos niajn amikojn en Västerås, kaj ke ili ĉesigos nek sian viglan agadon nek sian raportadon al ni. Al tiuj kiuj deziras informojn pri la tuta agado en Västerås, ni rekomendas, ke ili turnu sin al Wim Posthuma, Soldatgatan 40, 723 45 Västerås, tel. 021/13 35 29, por aranĝi abonon de la VEK-a Gazeto, la tre informo kaj ĝuinda kluba organo. Por niaj legantoj ni elektas ĉi-foje el la raportado tiun pri la familia tago.


Tiu okazis la 8-an de junio, kaj la ideo estis, ke ankaŭ neesperantistaj familianoj de la klubanoj konatiĝu al la kluba laboro. La arango ankaŭ donis eblecon diskuti pri estonta agado kun anoj de "dormantaj" grupoj en la ĉirkaŭaĵo de Västerås. Partoprenis ankaŭ kelkaj el la "ne-dormanta" urbo örebro.

La ĉefaj programpunktoj estis 1) enkonduka kurso, 2) radiokontaktoj kun esperantistaj amatoroj, 3) montado de du norvegaĵ filmoj kun esperantoparolo. Por la infanoj oni aranĝis ludetojn kaj jonglan prezentadon.

La enkonduka kurso estis bazita sur la frazo: "Bonan tagon, amikoj, mi salutas vin." Ĉirkaŭ tiu oni prezentis gramatikon kaj interparolon. Gvidis Torsten Farm kaj Ingrid Estholt. — Klubano Bengt Norberg havis radiokontaktojn kun amatoroj en Svedujo, Hungarujo, Germanujo kaj Skotlando, kaj pri tiu parto speciale atentis la loka gazetaro. La ĵurnalistoj el VLT je sia vizito ricevis — post alvoko — tujan respondon de du esperantistoj, kaj pozitive raportis.

Kungälv — Studvojaĝo al Szczecin

En la klubo en Kungälv oni ofte diskutas pri la eblecoj praktike uzi esperanton, do prezenti ĝin kiel naturan kaj bonan rimedon por kontaktoj kun eksterlandanoj antaŭ la neesperantistoj.



Tiun ĉi ŝildon Runo Stridell metis ĉe la akceptejo de la kampadejo de Borensberg. Oni tuj vidas la monon kaj adreson de la loka delegito.

Dum sufiĉe longa tempo oni en la komunumo diskutis en diversaj grupoj kiel okupigi la infanojn kaj gejunulojn posttagmeze kaj en liberaj horoj. Ĉar la klubanoj jam plurfoje vizitis la polan urbon Szczecin kaj scias pri ilia Junulara Palaco, oni decidis proponi studvojaĝon tien kaj speciale inviti personojn, kiuj diversmaniere okupas sin pri tiaj demandoj.

La studvojaĝo realiĝis en aprilo per helpo de la ŝtata vojaĝoficejo "Gromada" kaj la esperantistoj de Szczecin, kaj faris la vojaĝon miksitaj grupo de 15 personoj, esperantistoj kaj neesperantistoj. Post rondveturo tra la urbo oni vizitis la Junularan Palacon, kie la polaj gvidantoj dum kelkaj horoj rakontis pri iliaj metodoj por aktivigi la gejunulojn. Troviĝas tie la plej diversaj grupoj, kiuj praktikas dancadon, muzikon, modelkonstruadon, kudradon, kuiradon, skulptadon, pentradon. Oni ankaŭ lernas foti kaj filmi, ludi teatraĵojn, konduki aŭtojn k. t. p. Ĉio estas senkosta por la partoprenantoj. Dum nia vizito okazis aktivecoj en ĉiu ĉambro.

"Ni konstatis", raportas Märtha Andréasson, "ke ankaŭ en Pollando oni elektas okupon laŭ tradicia seksa rolo: la knabinoj dancas, kudras, kuiras kaj la knaboj konstruas radiosendilojn aŭ modelboatojn. La administraro de la Junulara Palaco provas ŝanĝi tion, sed estas malfacile, ĉar la infanoj rajtas libere elekti."

Vespere la grupon gastigis la lokaj esperantistoj en Kafejo Esperanto, tre bela ejo. Multaj lokaj esperantistoj alvenis kaj estas bedaŭrinde, ke ne ĉiuj en la sveda grupo sciis esperanton kaj povis interparoli kun ili, sed certe esperanton faris al tiuj bonan impreson.

Ni kredas al la raportinto ke "entute estis interesa, bona ekskurso", kaj ni pensas ke — kvankam ni neniel deziras malpliigi la valoron de informado per flugfolioj, afiŝoj k. t. p. — ĝuste tia uzo de la eblecoj de nia movado por celo, kiu interesas ankaŭ neesperantistojn — pli valoras por la disvastigo de nia lingvo ol centoj da broŝuroj aŭ plurhora nura parolo pri la utileco de esperanto.

Söderhamn — studsezona finfesto

Tute intence ni ellasis el la raportado ĉi-foje la grandajn urbojn Malmö, Stockholm kaj Göteborg, ĉar vi ne kredis ke gravas nur la "grandaj" kluboj. En Söderhamn troviĝas malgranda rondo kiu vere vidiĝas eksteren — la loka gazetaro preskaŭ regule raportas pri la agado kaj pri la vojaĝoj de la klubanoj. Ekzemple en la gazeto Ljusnan aperis la 29-an de aprilo sufiĉe longa artikolo pri la sezona finfesto en Söderhamn.

Estis arango por la partoprenantoj de la rondo por komencantoj, kaj partoprenis gastoj el Sundsvall, Gävle, Borlänge kaj aliaj sufiĉe malproksimaj lokoj. Oni montris filmojn el vizito en Maroko kaj Ake Näsholm kantis plurlingvan kanton. Rektoro Folke Wejbro, Gävle, rakontis pri la granda diferenco, kiun li mem spertis, inter la kongresoj internaciaj de la esperantistoj kaj aliaj grandaj internaciaj konferencoj, kie oni devas helpi sin per simultana interpretado kaj multekosta teknika ekipaĵo. Ĉar oni tiam uzas nur la "grandajn" lingvojn la reprezentantoj de la malgrandaj nacioj tamen troviĝas en malfacila situacio.

Tyresö — nova klubo

Tamen ni ne tute neglektas la ĉefurban regionon, ĉar ni devas raporti pri Tyresö. Tie fondiĝis, subite kaj preskaŭ neatendite, nova klubo. Tio okazis la 5-an de junio kaj la oficiala nomo estas Tyresö Esperantoförning. Certe ni baldaŭ aŭdos pli multon pri la nova klubo. En Tyresö loĝas — kiel vi eble scias — Franko kaj Ulla Luin, kiuj evidente ne laboras nur en la estraro de SEF sed ankaŭ trovas tempon por loka agado. Cratulon!

Kompilis: Ake Blomberg

NOVAJ KLUBOJ BEZONAS HELPON

Informado — jes, sed kie preni la monon?

La demando restas ĉiam la sama por malnovaj kaj novaj kluboj. Sed ofte la demando estas pli akra por tute novaj kluboj, kiuj startas kun kelkaj interesitoj kaj 0 kronoj en la kaso. Ofte la klubo devas elspezi la venontajn kotizojn antaŭ ol kolekti ilin, por entute atingi la homojn kiuj povos fariĝi membroj, per cirkuleroj kaj informmaterialoj.

Ideoj pri agadoj ne mankas ĉe la novaj kluboj. Ofte la kluboj eĉ naskiĝas pro tio ke iuj havas ideojn pri ebla loka agado. Samtempe la novaj kluboj serĉas pliajn ideojn kaj serĉas spertojn pri antaŭaj similaj agadoj.

La lasta problemo estas relative simple solvebla, ĉar ekzistas artikoloj kaj broŝuroj kiuj povas doni la necesan konon pri la sveda esperanto-movado.

Sed kio pri la mono... ?

Ulla Luin

Ni gratulas

ANDREO CSEH



La legenda figuro, pioniro de nia internacia movado, instruisto de pluraj generacioj da verdstelanoj, fondinto de Internacia E-Instituto kaj Universala Ligo batalanto per Esperanto por la mondpaco, iĝos 80-jara la 12-an de septembro 1975.

A. Cseh naskiĝis la 12/9 1895 en Transilvanio. Esp-iĝis jam kiel juna gimnaziano. En Transilvanio (Alba Iulia kaj Pecs), Hung. finis siajn teologiajn studojn kaj iĝis katolika pastro. En 1920 li ellaboris sian genian kursmetodon laŭ kiu li ekmarŝis sian triumfan edukon vojon en Sibiu k. daŭrigis tra la urboj Targu-Mureș, Cluj, ktp. En 1922 li fondis, kune kun s-ro Fischer-Galati, en Bukureŝto la E-Centron Rumanan. De 1921 Ĉefdelegito de UEA (delonge honora membro de UEA). En 1922 per la organizo de la unua Rumana Esp.Kongreso postmlita en Cluj k. postaj kongresoj en Oradea Mare, Ploesti, Bucuresti ktp. li revokis la dormantan rumanan E-movadon. En 1924 lia noblanima episkopo Majlath donis al li libertempon por tute dediĉi sin al la E-movado. Samjare li iĝis la sekretario de Internacia Centra Komitato en Genevo kaj kunlaboris en la organizo de la Universalaj Kongresoj en Genevo, Danzig k. Budapeŝto. Lastloke li donis sian unuan int. pedagogian kurson. Liaj postaj seminarioj por E. instruistoj fariĝis poste tradicio kaj la pedagogia spino de niaj Univ. Kongresoj. En 1927 SET invitis lin al

Svedujo, kie li gvidis aron da sukcesaj seminarioj k. kursoj, i.a. ankaŭ en la Sveda Parlamento en Stokholmo. Post grandaj kursoj en Estonio kaj Latvio, oni invitis lin al Nederlando. En 1930 li fondis, kun ges. Isbrucker la Int. Cseh-Instituton. Li fondis en 1932 la altnivelan revuon **LA PRAKTIKO**, kiun li brile redaktis dum ĉ. tri jardekoj. Li eltrovis kaj fondis la STELON, la internacian monunuon de Esperantujo. Oni povus plenigi dikajn volumojn per priskribo de lia ampleksa agado por la bono de nia movado. En lia jubilea tago certe sennombraj salutoj gratulaj atingos lin en Pensio Scholten, Groothertoginnelaan 162 DEN HAAG, 2012 NEDERLANDO. Plej taŭga formo de gratulo: aliĝo al UNIVERSALA LIGO, Postbuss 334, BUSSUM 1351, NEDERLANDO. Membrokotizo laŭvola, sed minimume 5 (kvin) guldenoj pageblaj al Amsterdam-Rotterdam Bank, Kneuterdijk 8 Den Haag, Nederl. Konto nro 43 06 97 708. Aŭ plej simple en pagu la egalvaloron minimume 10 (dek) svedajn kronojn, al la Sveda Poŝtĝirokonto nro 741 75-1 Stockholm.

T. M.

John Ek, konsilanto, Lund, fariĝis 75 la 5-an de julio.

ESPERANTO EN LA UNIVERSITATO

Estimataj legantoj:

Ĉiam, kiam la Prezidanto de Brazilo enoficiigas novan Rektoron en la Federacia Universitato de Ceará, mi devas skribi al vi.

Esperanto en nia Universitato progresas, kaj tion ni dankas al viaj ĉiukvarjaraj helpoj.

La rektoro kiu ĵus finis sian Rektorecon ricevis el la Esperantistaro pli ol 200 (ducent) gratulajn leterojn kaj tial li akceptis kaj helpis Esperanton dum tiuj kvar pasintaj jaroj.

Ni sugestas ke vi skribu al nova Rektoro, D-ro Pedro Teixeira Barroso, gratulante lin kaj samtempe montrante al li la valoron de Esperanto. Certe ankaŭ li komprenos ke nia lingvo meritas la apogon de gravaj personoj kiel li estas.

Uzu la sekvantan adreson: D-ro Pedro Teixeira Barroso, Rektora Moŝto de Federacia Universitato de Ceará, Av. da Universidade, 2853, 60.000 — Fortaleza — Ceará — Brazilo.

Paulo Amorim Cardoso
Kunordiganto de Esperanto-
Kurso de Federacia Uni-
versitato de Ceará.
Delegito de UEA

VETERANOJ FORPISIS

Olov Olsson

Nur antaŭ nelonge ni informiĝis, ke en Olofström mortis jam pasintan jaron Olov Olsson. Li eklernis esperanton en 1938 per la Instituto de Hermod kaj korespondis mondscale. Dum kelkaj jaroj li estis membro de la klubo en Svängsta.

Johan Adolf Sundberg, Härnösand, mortis la 29-an de junio. Li naskiĝis la 22-an de oktobro 1890 kaj, tre interesiata mondlingvano, li estis siatempe prezidanto de la loka grupo.

HARRY CARLSSON, Falköping

Fosestro Harry Carlsson, Falköping, mortis 10/8 1975, 71-jara.

Pro grava malsano Harry Carlsson dum la lastaj jaroj forestis el la esperantomovado. Sed por la pli malnovaj esperantistoj de Skaraborg li estis dum la lastaj jaroj unu el la veraj "rokoj" de nia movado en tiu parto de la lando. Prezidanto de la Esperanto-klubo de Falköping, vic-prezidanto de la Skaraborga distrikto, li preskaŭ neniam mankis ĉe esperantistaj renkontiĝoj en la regiono.

Harry Carlsson estis tre sperta, realisma kaj honesta homo — respektata en vastaj rondoj li okupis gravajn postenojn en la komunumo — kiu sciis solvi ĉiujn praktikajn problemojn kaj povis ĉion aranĝi. Oni longe memoros lin pro lia hela humoro — li ĉiam sciis rakonti gajan anekdoton — kaj pro lia sincera, fidele amikeco.

AB

VENONTA NUMERO

Limdato por manuskriptoj:
8 septembro.

Regiona agado

Jes, en tiu ĉi kazo ne temas pri regiona agado en Svedujo, sed pri la regiona agado de UEA. Nu bone, oni povas konsenti, ke "Regiona Agado" ne estas bele elpensita esprimo. Ĝi ne sugestas tion, kion ĝi devus sugesti.

Ĝi devus tuj elvoki Afrikon, Azion kaj Sudan Amerikon. Ĝi devus tuj komprenigi ke temas pri helpo al lokaj agantoj por la internacia lingvo en tiuj vastegaj regionoj. El ĝi oni devus senpere kompreni, ke UEA, la centra movada motoro, klopodas konstrui al si ankaŭ nigran kaj flavan vizaĝojn.

Jen koncize la baza "filozofia" fono de "Regiona Agado": UEA malgraŭ sia nomo ne estas universala. En ĝi tro multe superpezas eŭropanoj. Jam estas tempo "salti" de Eŭropo al aliaj kontinentoj kaj transformi ĝi de eŭropa saŭco kun kelkaj ekstereŭropaj spicaĵoj al plene miksitaj mangaĵoj.

Kaj jen mallonge laborprogramo sufiĉe konkreta:

- detala esplorado pri la stato de agado en ĉiu unuopa lando de Afriko, Azio kaj Suda Ameriko;
- ellaborado de ĝenerala trarigardo pri komunaj problemoj kaj ebla helpo;
- produktado de bazaj informoj broŝuroj, kiuj prezentu la internacian lingvon konsidere de la nuntempaj sociaj kaj kulturaj trajtoj de la koncernaj mondopartoj;
- produktado de baza kursoteksto por lernado de esperanto, kiu estu facile tradukebla al lokaj lingvoj fare de lokaj esperantistoj;
- kontaktado kun neesperantistaj interesaj instancoj aŭ individuoj;
- kaj tiel plu...

Kiel statas nun — 1975 — la laboroj de la komitata komisiono pri landa agado koncerne la ĉi-supran laborplanon? Simple ni povas diri, ke Afriko estas "esplorita" kaj Azio "esplorata" dum Suda Ameriko restas alfrontenda.

Baza broŝuro "Por defendo de afrikaj kulturoj" estas produktita kaj tradukata al la malagasa. UEA intertraktas kun lokaj esperantistoj pri eldonado de vortaroj kaj gramatikoj en du-tri lingvoj dum profesoro Serdahej de la budapeŝta universitato pretigas provlecionojn por gramatiko tradukebla al la sŭahila, haŭsa kaj amhara lingvoj.

La Germana Esperanto-Asocio decidis donaci 500 germanajn markojn por la "Regiona Agado" de UEA. Kiu landa asocio sekvos?

Kion vi mem povas fari? Vi povas unuavice kontakti la respondeculon kaj informi lin pri viaj ideoj pri "Regiona Agado" kaj pri via ebla helpo per informoj, konsiloj kaj, kial ne, per mono.

La respondeculo estas: S-ro Renato Corsetti, via Strabone 1, 00176 Roma, Italio.

Korespondu

Knaboj 16-kaj 17-jaraj, fratoj: Nikolaj kaj Todor Mitrojevici, ul. Boyka 42, distr. Ruse, 7100 Bjolov-garaton, Bulgario.

Studentino, 16-jara: F-ino Cecilia Alegua, Fasilla 110 31, Lima 14, Peruo.

Pri literaturo, sporto, turismo ktp: Ernest Tews, O. s. W. Zökniavzy 5/18, 58-260 Bielawa, Pollando.

18-jara rumanino: Valentina Tudorache, str. Herastru 18, Sector I, Bucuresti, Rumanio.

25-jara kolombiano: David Correa Roldén, Carrera 83, Nro 49 E -52, Medellin, 2, Kolombio, Suda Ameriko.

Librovendejoj kaj esperanto

Se iu ekhavas la ideon ekscii iom pri esperanto — kion tiu homo faras?

Unu ebleco estas iri al librovendejo por rigardi ĉu troviĝas io pri esperanto tie. Kaj jes, troviĝas io. Dum multaj jaroj troviĝis lernolibro pri esperanto — en la angla. Ĉu do oni devas unue lerni la anglan por povi lerni esperanton?

Ekde kelkaj monatoj troviĝas en la librovendejoj ankaŭ svedlingva lernolibro, nome "Ek!", de Hermann Behrmann (Esperantoförlaget, ĉirkaŭ 28,50 kr.).

Sed librovendejoj estas ekonomiaj entreprenoj. Laŭ interkonsento, ĉiu plenrajta librovendejo devas havi en sia stoko la novajn librojn. Kiam la libroj ne estas plu novaj, la librovendejo ne plu estas devigataj havi ilin, sed se la libroj bone vendiĝas, oni povas facile trovi ilin sur la bretoj de la librovendejoj.

Laŭ simila interkonsento, la eldonejoj kiuj volas vendi siajn librojn pere de librovendejo, devas promesi ke ilia vendpolitiko estos favora al la librovendejoj. Tio ja inter alie signifas ke la eldonejo ne vendu tiujn librojn rekte al la aĉetantoj je pli favora prezo ol la librovendejoj.

Do, volonte faru reklamon en via urbo ke oni lernu esperanton. Kaj volonte faru reklamon ke oni aĉetu la lernolibron en la librovendejo!

Ulla Luin

JARLIBRO 1975

Jarlibro en unu parto! Jen la unua signo de la ŝparkampanjo de UEA.

La ŝparoj estas lerte faritaj, kaj la ŝanĝoj ĝenerale signifas ke la libro fariĝas pli facile uzbla.

Anstataŭ kompleta librolisto, oni trovas mallongan aldonon al la pasintjara librolisto. Por tiuj kiuj deziras aceti iun freŝe aperintan libron,

la listo do estas pli utila ol antaŭe. Sed kompreneble oni esperas ke ankaŭ estas aŭ estos havebla kompleta listo por tiuj kiuj estas novaj UEA-membroj.

Adresoj de la landaj asocioj ekde nun troviĝas en rekta kunligo kun la listoj pri delegitoj, kaj tio estas avantaĝo.

Estrara raporto estas tute ellasita, sed havebla senpage ĉe la Centra Oficejo por tiuj membroj kiuj deziras ĝin.

Cetere enestas la kutimaj utilaj informoj, kiel listo pri fakaj organizaĵoj, pri ĝisnunaj universalaj kongresoj, estraranoj kaj komisionoj de UEA, eldonejoj en diversaj landoj, teksto de rezolucio de Unesko 1954, radiostacioj ktp.

Cefa enhavo estas kutime la delegitaj adresoj, kiuj ĉi-foje ampleksas preskaŭ 300 paĝojn. Eblas jam fari etan mondvojaĝon foliumante la libron: Venezuelo, Pollando, Israelo, Ĉinujo, Bulgarujo, Britujo — entute 64 landoj.

Ulla Luin

FÖRLAGSFÖRENINGEN

ESPERANTO

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Adreso: Esperantoförlaget, Fack, 200 42 Malmö 7

Ejo: Möllevångsgatan 20 B

★

Dejortempo 1 sept.—15 majo:

merkredo 10.00—11.00

ĵaŭde 17.00—18.00

Skribaj mendoj ekspedataj dum la tuta jaro.

Tel. 040 / 12 20 29. Postgiro 578-5.

★

Administranto: Anna-Greta Strönnen

Tel. hejma 040 / 12 92 11

Prez. Åke Blomberg

La Espero

Svenska Esperantotidningen

Organ för Sv. Esperantoförbundet,

Fack, 122 04 Stockholm-Enskede.

Hägervägen 31.

Postgirokonto 20 12-3.

Ansvarig utgivare: Bertil Akerberg.

Redaktör: Åke Blomberg, Lidåkersgatan 6 C, 531 00 Lidköping.

Tel. 0510-286 42 (arb. 0510-221 30).

Medlemsavgift för direkt medl. 25 kr, ungdom 10 kr, familjemedlem utan tidning 5 kr.

Prenumerationspris 25 kr.

Förbundets sekretariat är öppet onsdagar kl. 18—20, tel. 08-48 99 76.

Sturetryckeriet AB - Stockholm 1975